

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la laboro de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando. Vi aŭdas la kvinan prelegon pri tiu temo.

Ni finu nian studon de la laboro de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando per ekzameno de la atingitaj rezultoj.

La ĉefa rezulto kompreneble estas, ke milito ne eksplodis pri la Kongo-afero. La UN-Forto, kiel ni jam vidis, rapide okupis malplenan teritorion, kies kaosa situacio estis invito al armitaj intervenoj de la grandaj potencoj.

Ekzistas hodiaŭ en Kongolando Centra Registaro, kiu ekzercas efektivan aŭtoritaton sur pli ol 14 milionoj da loĝantoj en vasta lando, kies integreco kaj unueco estas restarigitaj. Oni povas diri, ke la socia situacio estas kritikebla, sed ĝi tamen konsiderinde pliboniĝis rilate la tempon de la armea ribelo. Tiam la UN-Forto devis senĉese interveni en la tuta lando por protekti la loĝantaron kontraŭ la banditismo de ribelantoj kaj memvenĝemuloj. Multaj eŭropanoj, kiuj fuĝis en Eŭropon, revenis en la landon por repreni siajn produktivajn aktivecojn. Kompreneble ne temas pri kolonieluloj, sed pri kuracistoj, edukistoj, fakuloj, inĝenieroj, honestaj komercistoj kaj kulturistoj, kiuj jam sub la belga reĝimo laboris al la plibonigo de la lando.

La alveno de la UN-trupoj en Kolwezi la 21-an de januaro 1963 permesis elimini la lastan gravan koncentradon de fremdaj dungsoldatoj el Katango. Tiuj aventuristoj kaŭzis al tiu provinco gravajn vundojn. Ili ĉefe respondecas pri la sistema eksplodigo de la plimulto de la pontoj en la nordo kaj multaj pontoj en la sudo, tio pro nura detru-plezuro. Tiu detruo de komunikiloj estas forta bato al la ekonomio de la lando. Tiuj dungmortigantoj fuĝis en Angolon, kie ili povos plenumi siajn krimojn dum kelkaj pliaj jaroj je la servo de la portugala armeo.

Dank'al Unuiĝinta Naciaro, kaj nur al ĝi, la esencaj publikaj servoj povis esti konservataj. La svarma foriro en julio 1960 de la eŭropaj koloniistoj minacis detrui la socian vivon, ĉar tiuj homoj okupis ĉiujn ŝlosilpostenojn de la kongolanda ekonomio. La fakaj organizaĵoj de UN rapide trovis la urĝajn necesajn anstataŭulojn. La kompleta malorganizo de la esencaj servoj tiel evitiĝis.

Plie UN entreprenis tujan formadon de kongolanda fakularo por povi iom post iom cedi al ili la gvidilojn de la lando. Monda Organizaĵo por la Sano garantiis la funkciadon de la medikaj servoj, Organizaĵo por Internacia Civila Aviado asekuris la funkciadon de la aeraj komunikadoj, kiuj estis nepre necesaj al la vivo de la lando. Aliaj fakaj mondinstitucioj kiel Internacia Labor-Organizaĵo, Organizaĵo por Nutrado kaj Agrokulturo, Unesko, Universala Poŝta Unuiĝo, Internacia Unuiĝo por Telekomunikadoj kaj Monda Meteorologia Organizaĵo alportis analogan asistadon koncerne sian fakon.

La ribelo de la armeo, kiu dum la unuaj tagoj de la sendependiĝo nomiĝis Publika Forto estas la esenca kaŭzo de la gravaj malordoj, kiuj eksplodis en la lando dum la semajno, kiu sekvis la sendependiĝon. Ĝis tiam ĉiuj oficiroj estis belgaj, ekzistis neniu kongolandano preparita por okupi tiun oficon. Kiam la soldatoj ribelis kontraŭ siaj belgaj oficiroj, la armeo subite troviĝis sen estroj. UN nenion neglektis por helpi la Centran Registaron formi kaj reorganizi la kongolandan armeon. Iuj progresoj efektiviĝis, sed de longe ili ankoraŭ ne sufiĉas. Sen la apogo de la UN-Forto la kongolanda armeo hodiaŭ estus nekapabla konservi la publikan ordon en la tuta lando.

Post la disfalo de la Centra Registaro komence de aŭtuno 1960 la lando troviĝis sen leĝa registaro dum unu jaro. La ĉeesto de UN dum tiu periodo estis la sola garantio de sekureco. UN alportis sian protekton al ĉiuj, inkluzive la individuojn kaj la minoritatojn submetitajn al

triba perforto aŭ al diversaj naciaj aŭ provincaj aŭtoritatoj. Dum la vintro 1960-1961 UN okupiĝis pri la nutrado kaj reloĝigo en la Kasi-provincon de 250'000 Balula-rifuĝintoj.

Dank'al la klopodoj de UN oni povis ripari la mankon de leĝa registaro kunvokante la kongolandan Parlamenton. UN organizis ĝian kunsidon, retrovis la parlamentanojn, veturigis ilin al Léopoldville kaj protektis ilin kaj la Parlamentejon dum la sesio de Julio 1961, kiu restarigis konstitucian registaron havante kiel estron la ministron Adula.

Kiel ni jam vidis, la Operacio de Unuiĝinta Naciaro estis la decida elemento, kiu permesis dispeli la minacon de secesiaj movadoj. Ni vidis, ke la U Thant-Plano alportis konstruajn reformojn, kiuj permesos nacian reamikiĝon. Nun la UN-Forto iom post iom reduktiĝas kaj UN povas ekrealigi vastan programon de ekonomia kaj teknika asistado dank'al fonduso por Kongolando, kiu estas nutrata de memvolaj kontribuoj de la ŝtatoj. Depost septembro 1960 ĝis la fino de 1962 tiuj kontribuoj atingis 40 milionojn da dolaroj aŭ 532 milionojn da steloj. Tiu asistado, kiu unue devis esti rapide improvizata, povis esti racie organizita ekde 1963. Ĝis hodiaŭ sescent naŭdek tri kongolandanoj ekfrekventis formad-kursojn organizatajn en la lando mem sur la aŭspicio de UN kaj ducent kvardek unu aliaj ricevas formadon dum-ofice en la lando mem kaj kvarcent aliaj finas rapidtempan kurson organizitan de UN mem. UN varbis okcent kvindek ok fakulojn el plej diversaj landoj, kiuj estas ŝarĝataj asekuri la funkciadon de la publikaj servoj en Kongolando. Krome je la 1-a de januaro 1963 mil cent tridek kvin spertuloj troviĝis en la lando. Inter ili duono estas profesoroj.

Je la demando de la Centra Registaro la helpo de UN fariĝos longdaŭra koncerne la fakojn instruado, sano, publika administrado, inĝenieraj teknikoj, ponto-riparo, stratoj, fervojoj. Jen bela labor-programo por UN kaj por sindonemuloj el privilegiitaj landoj.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la laboro de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando. Se vi deziras aŭdi la lastan prelegon pri tiu ĉi temo, ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-